


A.Kerbel

Kantanta kantareto

kantoj originalaj
kaj
tradukitaj



Hajfo
2012

Enhavo

Tekstoj kaj melodioj verkitaj

Leporo.....	3.
Vulpino.....	5.
Floroj.....	6.
Fumado.....	7.
Tramo.....	8.
Aliplanedano.....	9.
Tage kaj nokte.....	11.

Tekstoj tradukitaj, melodioj verkitaj

Strigino kaj kato. Edward Lear.....	12.
Vi ja min forlasis, Ĝemi. Robert Berns (Burns)....	14.

Tekstoj tradukitaj, melodioj prenitaj

Tuta nia mond. Hebrea tradicia.....	15.
Adiaŭe (la aŭtoroj ne estas konataj al la tradukinto)	16.
Venis temp' (same).....	17.
La reĝo revenis (same).....	18.

Tekstoj tradukitaj

Konversacio en vagono-restoracio. Aleksandr Galiĉ	19.
Balado pri Oriento kaj Okcidento. R. Kipling.....	21.
El verkaro de S. Marŝak.....	27.

Tekstoj kaj melodioj verkitaj



Leporo

En arbarego krias mandolin',
tintas gitaro, ridas junulin'.
Saltas leporo tra la arbustar',
saltas savante sian vivon...

– Haltu, haltu leporo,
vane vi timas, ja ni estas homoj!

– El la lulilo eta suĉinfan';
manojn etendas al la armilar';
gutas salivon, ride diras «paf!»,
premas, stultulo, ellasilon...

– Vi ne pravas, leporo:
gaja ludad' preferindas al ploro.

– Akvobariloj putras en river',
maroj sekiĝas, polvas atmosfer',
ter-oksigenon rabas aviar',
en oceanoj flosas nafto...

– Vi eraras, leporo:
ĉio subiĝos al homo-sinjoro.

– Virgaj arbaroj cedas al kampar',
kampojn priŝtelas brua urbegar',
urbojn dronigas propra rubamas',
ĉion venenas forĵetaĵoj...

– Vi mensogas, leporo:
homon difinas puremo rigora.

Egaj segiloj muĝas per benzin',
arboj disfalas, ridas junulin',
saltas leporo tra la arbustar',
super segaĵo kaj rubaĵo...
– Haltu, haltu, leporo,
kuglon ricevu, ja ni estas homoj!



Vulpino

Somera arbaro, rosguta padet';
flamruĝa vulpino, en dentoj muset';
brilaj okuloj, nigra naz':
sensdelikata mens-kompas'.

Arbar-maldensejo, birdeta rulad',
ridanta ĉielo, vulpida ludad':
gaja saltad', petol' sen fin';
ilin rigardas la patrin'.

Ekpluvis ĉielo, ekstremis arbar';
ĉasisto ebria, enbuŝa cigar';
palaj okuloj, ruĝa naz',
luks-karabeno, ventra gras'.

Sufoka urbego, enkaĝa natur',
laŭmoda virino, vulpida terur':
de kolumego de l' putin'
ilin rigardas la patrin'.



Floroj

Floroj havas propran vivon,
ili havas propran sorton...
Sed pro kio homaj manoj
tiel ofte portas morton?
Se ne estas flor' plaĉinda,
ni ne timas ĝin suriri;
rimarkinte floron belan
ni rapidas ĝin deŝiri.

Juna roz' en bela vazo
velkas sole, senatente;
lastaj ĝemoj kaj turmentoj
prikaresas ies sentojn.
Mortas flor' en vitra ĉerko,
foliaro velkas brune...
Ĉu pro tio flor' kaj morto
tiel ofte iras kune?

Junulin' petalojn tiras,
ŝiaj vangoj rave flamas;
disŝirante kamomilon
flustras: amas aŭ ne amas?
Se ni vere amas florojn
vivu ni kun ili pace.
Graciecaj vivaj korpoj
belaspektos je donaco.



Fumado

Bela skatolo, sur ĝi etiked’;
varma odoro, kolora bildet’;
uzas fumaĵojn tuta mond’:
reĝ’ kaj vagabond’.

Pipon fumegas salita marist’,
fumas cigaron famulo-verkist’,
kaj, onidire, dolĉa fum’
helpas dum cerbum’.

Refreno:

Mi neniam fumis.

Mi neniam fumis.

Kaj neniam fumos.

Fumas nervoze elstara aktor’,
fumas pripense fizikprofesor’,
fumas sorĉisto en dezert’,
inoj post desert’.

Fumas junulo por vira aspekt’,
dando fumetas pro modorespekt’;
fumas ministro, instruist’,
eĉ medicinist’.

Refreno.

Malgraŭ estimo al monda kultur’
kraĉas mi laŭte pri tiu plezur’.
Modon aliĝu vir’ kaj in’,
mi ignoras ĝin.

Refreno.



Tramo

Malhelas noktaj lampoj,
singarde musoj gratas,
kaj sonĝas laca tramo
pri malproksima land':
pri floroj en herbaro,
pri birdoj en arbaro,
pri ondobraŭa oceana strand'.

Ĉi tiun traman landon
tramaro saĝe regas,
ĉar ĉiu estas tramo:
pentristo, profesor',
paŝtisto estas tramo,
vendisto estas tramo,
kaj tramo trame tramas al labor'.

Se povus mi konvinki
la relojn ferodorsajn,
ke lasu ni ĉi-urbon
kaj tuj veturu for...
Sed reloj kurbiĝemaj,
timeme obeemaj,
balbutas pri sinjoro semafor'...



Aliplanedano

En loko kie nuboj
perfulme fendas rokojn,
kaj kirlas arda lafo de vulkanoj,
eĉ vivojn kelkajn savis
per sia forta vosto
amiko nia, aliplanedano.

Genuoj enmetanis
en marĉoj jupiteraj,
gravito premis kiel fera mano,
ĝis kiam nin birdigis
per antigravitilo
amiko nia, aliplanedano.

Refreno:

Sur frosta luna grundo,
sub tero surĉiela,
kuraĝe kantas gaja turistaro.
Sed penu ne forgesi
pri leĝoj de fiziko,
se estas akustika la gitaro.

En granda luna cirko
videblas eĉ de Tero
amaso da turistoj kaj infanoj,
ĉar trejnas krokodilon
paroli esperanton
amiko nia, aliplanedano.

Se venos iam tempo
forlasi nian mondon
pro besto marsa aŭ venus-malsano,
por ĉiam en memoro
konservos kunvagadojn
amiko nia, aliplanedano.

Refreno.



Tage kaj nokte

Tage kaj nokte laboras homaro
senlace.

Ĉiu akcelas feliĉon kaj vivon
en paco.

Antaŭ ĉiu planedo demandojn
starigas.

Oni responde prirabas ĝin kaj malpurigas,
difektigas.

Refreno:

Tra mateno kaj nebulo,
iras homoj al laboro;
kaj revenas dum vespero,
dum malseka neĝa horo.

Aŭtobusoj lace bruas,
frostigas koron glacio:

Ĉu por tio ili vivas,
ĉu ili vivas por tio...

Multaj demandoj kaj multaj respondoj
sonoras.

Ili pritraktas landlimojn sed Teron
ignoras.

Ĉu povas savi planedon nur
mond-registaro,
ĉu pro nuklea milito pereos homaro,
post kelkjaroj...

Refreno.

Tekstoj tradukitaj, melodioj verkitaj



Strigino kaj kato

Edward Lear, 1812-1888.
Fama angla aŭtoro de humuraj ...sensencaĵoj.
(Laŭ rusigo far S. Marŝak).

Strigino kaj kato en eta boato
ekvelis post longa preparo,
preninte bombonojn kaj iom da mono,
por fari aĉetojn trans maro.

Dum lun' brilliantis, strigino ekkantis
ĉe sonoj de l' mandolino:
«Jam pli ol monato mi amas vin, kato,
ĉu estas vi mia destino?»

Per voĉo beata respondis la kato
post tre eleganta vost-svingo:
«Kun vi ĝis vertiĝo mi volas edziĝi,
sed kie akiru ni ringon?»

Pli longe ol jaro vagadis la paro,
ĝis kiam en fora oazo,
en lando mondfina aperis porkino
kun ringo edziĝa en nazo.

«Je kio vi pretas forŝanĝi ringeton?»
Porkino elektis spegulon.
Kaj pastro-ansero en kirko somera
edzigis l' feliĉajn kunulojn.

Ĉi-tage la paro trinketis nektaron
sur bordo de bela laguno.
Kaj nokte man-mane sur strand' oceana
dancadis sub lumo de luno.



Vi ja min forlasis, Ĝemi

Robert Berns (Burns 1759–1796).
(Laŭ elangligo far S. Marŝak.)

Vi ja min forlasis, Ĝemi,
vi ja min forlasis.
Porĉiame lasis, Ĝemi,
porĉiame lasis.

Vi nur ŝercis, kara mia,
vi pri mi ruzetis:
ĵuris pri l' fidel' ĝismorta...
Kaj post tio lasis, Ĝemi,
kaj post tio ĵetis.

Ni ne estos kunaj, Ĝemi,
ni ne estos kunaj.
Kio ajn okazu, Ĝemi,
ni ne estos kunaj.

Venu do benata tago
de l' trankvil' eterna.
Mi okulojn miajn fermos...
Kaj por ĉiam estingiĝos
mia viv-lanterno.

Tekstoj tradukitaj, melodioj prenitaj



Tuta nia mond'

Tradicia. Elhebreigo.

Tuta nia mond'
estas nura pont'
estas nura pont',
tre malvasta pont'.

Tuta nia mond'
estas nura pont',
tre malvasta pont'.

Kaj gravegas grava afer':
ne timiĝu, ne timiĝu tute,
forte tenu en la memor':
ĉiun timon
for!



Adiaŭe

Elrusigo.

Adiaŭe donacu al mi bileton,
por ke veturu mi ien ajn.
Ne gravas al mi direkto aŭ lok',
nur ekveturu trajn'.

Adiaŭe donacu elkorajn vortojn,
por ke amara ne estu voj'.
Ne gravas al mi ilia enhav':
estas ja lasta foj'.

Turmentas min viaj okuloj karaj,
via karega por mi vizaĝ'...
nek sudo nek nordo gravas por mi,
gravas por mi vojaĝ'.

Sed se vi elkrios «revenu, kara!»,
trajna obee ĉesiĝos kur',
ĉar via rideto estas por mi
sola en viv' plezur'.



Venis temp'

Elrusigo (iom ŝanĝita).

Neatendite venis temp',
vokanta al la malproksimo.
Ŝnuregon, kamarad', deligu,
voj' atendas nin senlima.
Sovaĝe fajfas ŝtorma vent'
kaj brue ondas mar'...

Refreno:

Sed malgraŭ ĉio ni foriras, karaj,
suprenigu ni velaron jam.
Sed malgraŭ ĉio ni foriras, karaj,
supreniĝas la velar'.

– Pripensu bone, kamarad',
ĉu vere indas forveturi?
Surborda viv' trankvilas pli,
sencelas vane aventuri.
Rigardu kiel fajfas vent'
kaj brue ondas mar'...

Refreno.

Verŝajne kulpas vojdezir',
verŝajne kulpas romantismo.
Sed ne forgesu pri efiko
de ĉi-loka aĉa ismo.
Sovaĝe fajfas ŝtorma vent'
kaj brue ondas mar'...

Refreno.



La reĝo revenis

Elrusigo.

Batala kiras', porlamula baston;
la reĝo revenas al hejm' de l' milit'.
Tra polvo kantadas soldata kolon',
kaj kune kun ĝi kantas reĝ-invalid'.

Nimura veluro kaj silk' el Lion';
atendas reĝin', rigardante al voj'.
La reĝon vidinte de l' tura balkon'
ŝi svingas tuketon, ŝi kantas pro ĝoj'.

La vest' ĉifonita, sed ĉapo kun flor':
sur placoj dancadas feliĉa popol'.
Kaj ankaŭ la reĝo en tiu ĉi hor'
kantadas plengorĝe en buba frivol'.

Tambura krakad' kaj standarda girland':
La reĝ' de l' milito revenis al hejm'.
Li perdis milite duonon de l' land'...
sed ĝojas ke restis vivanta li mem.

Tekstoj tradukitaj

Konversacio en vagono-restoracio

A. Galiĉ. Elrusigo.

Nokto, trajno, lumetar', rela kastanjeto.
«Vodkon, frato, kaj al ĝi iun postmanĝeton!»

– Vidu, mano de la sort' min kruele batas.
Kun drinkaĵo, aŭ sen ĝi, same pensoj gratas.

Ne pro aĝo grizas mi, kaj piedo solas...
aŭdis vi pri **Magadan**¹? Aŭdu, se vi volas.

En barakon, kie mi prikalkulis jarojn,
venis nokte ĉefgardist' kun la gardistaro.

Jen la fino! pensis mi; ĝis-is perinsulte...
Freŝpeklitan kukumegon maĉis li singulte.

Diras manĝe ĉefgardist', besto apatia:
«Pasis grava konferenc' komunist-partia.

Oni traktis pri Laos', pri Antil-insuloj,
sed aparte temis pri **Patro-Geniulo**²».

Elmuzelis ĉefgardist' kun dolor' profunda:
«Evidentas nun ke Li estas... aĉa hundo.

-
1. **Magadan**: orient-siberia “ĉefurbo” de malliberejoj.
 2. **Patro-Geniulo**: Stalin.

Venis, fratoj, telegram' senapelacia:
"Statuegon ĵetu for de l' fervojstacio"».

Vi imagu: besta frost', nokto, vent' enorma,
sed sur Li vestetas nur palto uniforma.

Ĉiorompe staras Li super mond' fragila.
Lian boton frapis mi... krevis la hakilo.

Mi memoras: estis mi knabo senkonscia,
kiam l' patro ruinigis kirkojn reakciajn.

Falas kirko sur la ter' per kupolo brila...
Kio, fakte, estas ĝi? Simpla narkotilo!

Sed Eterna Geniul', Frato-Instruisto...
Ĉiuj kune ploris ni. Ankaŭ la gardistoj.

Sed ektondris dinamit' finekzekucia...
Falis mi, kaj falis Li, kun duonstacio.

Liberigis oni nin por interna servo.
Restis viva mi ĝis nun, sed ŝiriĝis nervoj.

Rulas, bruas l' vagonar', peza invalido,
tra fenestroj grimpas ĝin aĉaj satanidoj...

Huŝ, mortintoj, iru for! Lasu min... je Dio!
Nokto, trajno, lumetar', vojo siberia.

Balado pri Oriento kaj Okcidento

R.Kipling
(iom kurtigita)

Ho, East is East and West is West
And never the twain shall meet...

Neniam moviĝos de l' lok' oriento,
kaj ankaŭ ne okcidento,
ĝis venos momento de l' juĝo terura
al tero kaj al firmamento.

Sed ĉu tio gravas, ĉu tio gravetas?
Neniom! (jen estas respondo),
se du forteguloj, vizaĝ' al vizaĝ',
ekstaras ĉe rando de l' mondo.

Kamalo, rabisto, kun siaj kunuloj
forkuris al limo, de puno.
Kaj de l' kolonelo li ŝat-ĉevalinon
forŝtelis dum nokto senluna.

Li ŝin forkondukis el stal' regimenta
sen iu ajn homa asisto.
Sed venis jam filo de la kolonelo,
gvidanto de lim-esploristoj.

«Nu, kion anaro de mia taĉmento
supozas pri voj' de l' ŝtelisto?»
Elpaŝis lokulo, leganto de spuroj,
konata pro sia persisto.

«Tra Abazabaj li galopos dumnokte;
mateno lin trovos en Reco.
Fortreson Buklo preterpasos li tage.
Ne estas alia ebleco.

Se tuj vi ekrajdos al tiu fortreso,
se fluge galopos al loko,
atingos vi l' homon, kun helpo de Dio,
ĝis montofendejo Ĝeroko.

Sed se li enrajdis jam tiun fendejon,
revenu, evitu provokon,
ĉar svarmas en ĝi kunular' de Kamalo,
do ege danĝeras la loko:

Maldekstre rokego kaj dekstre rokego,
sablejo, arbust', keirantoj...
Aŭdiĝos klaketo de fora fusilo,
sed vi ne rimarkos pafanton».

Sursaltis la filo de la kolonelo
sur sian nigregan ĉevalon.
Infero en brusto; hufferoj senrustaj
tambur-sonorigis la valon.

Fortreson Buklo algalopis la filo.
Lacigas padeto ŝtonoza...
Sed se vi postkuras ĉeliman ŝteliston,
forgesu pri frua ripozo!

Kaj jen ekvideblis Kamalo, rajdanta
sur ŝat-ĉevalino de l' patro.
Videblas figuro, videblas vizaĝo,
kaj eĉ survizaĝa cikatro.

Elpafis junulo unue kaj due;
la kugloj trafajfis mortkanton...
«Soldate vi pafas», – rimarkis Kamalo, –
«ĉu bonas vi kiel rajdanto?»

La montofendejo pleniĝis per polvo
de sia komenco ĝis fino.
Al cervo similis junula Nigrulo;
al kapriolin' – l' ĉevalino.

Jen dekstre rokego, maldekstre rokego,
sablejo, arbust', keirantoj...
Trifoje aŭdiĝis fusila klaketo,
sed li ne rimarkis pafanton.

Nigrulo ekstumblis ĉe ŝtona amaso,
perkorpe torenton ekbaris.
Kamalo desaltis de la ĉevalino,
kaj jam la junulo ekstaris.

El mano junula senkuglan pistolon
forigis Kamalo per bato.
«Tro longe», – li kriis, – «vi min persekutis,
tro longe mi estis kompata!

Pafistoj troviĝas post ĉiu ŝtonego.
Por ili ĉi-loko – areno.
Se manon mi levus, por multaj ŝakaloj
prezentus vi noktan festenon».

Respondis la filo de la kolonelo:
«Bestaĉojn manĝigi ne hastu.
Valoras atente pristudi prezaron,
ĝis oni kunvokas la gastojn.

Se milo da sabroj, por preni la ostojn,
aperos ĉe vi iutage,
ĉu povos la gajan ŝakalan festenon
l' vilaĝa ŝtelisto pripagi?

Unue ĉevaloj fortretos la kampojn,
la grajnon forprenos soldatoj.
Brutaro vilaĝa ekestos buĉata,
kaj falos en flam' viaj ĥatoj.

Se vi ne hezitas, se vi jam decidis
akcepti la venĝon fatalan...
Ŝakalo kaj hundo parencas, ĉu ne?
Kunvoku, hundaĉo, ŝakalojn!

Sed se ne allogas vin la konsekvencoj,
ne volas vi pagi malŝpare,
redonu al mi ĉevalinon de l' patro;
revojon ni trovos memstare».

Kamalo kroĉiĝis kaj fikse rigardis
la filon de la kolonelo.
«Nek vorto pri hundoj», – elsiblis li raŭke,
– «ĉi temas pri lupa kverelo».

«Neniu domaĝo vin trafos ĉi tie.
Se jes, mi manĝaĉu argilon.
Eĉ morton vi, ŝajne, kapablas forruzi,
por vi ne ekzistas bariloj!»

Respondis la filo de la kolonelo:
«Honor' familia rigoras.
Al vi mia patro *donacas* la beston.
Rajdanto ĝin certe valoras».

Premiĝis per kap' l' ĉevalin' al l' junulo...
«Ni estas fortega homparo», –
deklaris Kamalo, – «do prenu ŝin kune
kun selo kaj kun l' rimenaro».

Pistolon elkaptis kaj donis subite
la filo de la kolonelo:
«Unuan forprenis vi de l' malamiko,
ĉi tiun donacas ĝemelo.»

«Al via donac' mi respondos donace», –
rimarkis Kamalo ĝentile, –
«la filon alsendis post mi via patro;
mi donos al li mian filon».

Fajfegis Kamalo; junulo aperis,
ĉe l' patro ekstaris maltriste.
«Ekkonu la mastron: li gvidas taĉmenton,
taĉmenton de lim-esploristoj.

Ĉe li vi troviĝu kaj estu ŝirmilo
de kuglo, de ŝton', de ponardo.
Kaj ĉie: en domo, dezerto, ĝangalo,
ĉi tiun ligiĝon vi gardu.

Fidela vi estu al brita reĝino,
ricevu salajron stabilan...
Kaj, eble, atendas vin rango serĝenta;
kaj eblas ke min – pendigilo...»

Sursaltis la knabo sur sian ĉevalon;
junulo – sur la ĉevalinon.
Fortreson Buklo algalopis la paro,
kaj venis al ĝia fascino.

Kaj jen, malfermiĝas fortresa pordego,
ekbrilas dudeko da sabroj,
kaj ĉiu el ili intencas venigi
la knabon al fino makabra.

Sed kriis la filo de la kolonelo:
«Ne decas armila apliko:
dum nokt' mi postrajdis ĉeliman ŝteliston,
revenas mi nun kun amiko.»

Neniam moviĝos de l' lok' oriento,
kaj ankaŭ ne okcidento,
ĝis venos momento de l' juĝo terura
al tero kaj al firmamento.

El verkoj de Marŝak

Samuil Marŝak 1887-1964.
Elrusigo.

Ĝentila estu al paser',
ne tro fieru ĉe anser';
kaj en kokin-bieno
ne fanfaronu pri l' inklin'
al pufa litkuseno.

Devoju ni, se iras bov'
kolera aŭ morna,
ĉar estas ĝi kornhava brut',
sed mi kaj vi – senkorna.

Volonte mi manpremas homojn stultajn.
Elkore fluas ardo de l' dankem':
ĉar se ne ili stultus, do, rezulte,
okazus stulta kiu? Jes, ni mem!